


prepari festojn kaj vojaĝojn. La celo de tiuj vojaĝoj ne estis tre malproksima pro tio, ke mankis la financaj rimedoj sufiĉaj; sed tiuj junaj vilaĝanoj tiuokaze vizitis la marbordon nordan aŭ okcidentan, la unuan fojon en sia vivo. Multaj el ili eĉ la unuan fojon tiamaniere uzis la trajnon. Post kelkaj jaroj la vojaĝantoj povis pasigi plurajn tagojn ĉe la marbordo! Tion la paro Micard povis fari dank'al la financa profito de la festoj. Sed imagu, kiom da laboro postulis la preparado de tiuj festoj: elekti taŭgan programon, pretigi ofte mallertajn vilaĝanojn por prezentado de kantoj, dancoj, teatraĵoj. Oni devis fari la kostumojn, la dekorojn. Ne ofte gesroj Micard enlitiĝis je taŭga horo. Sed per tiu laboro ili atingis duoblan, por ili tre gravajn celojn: per la mono enspezita ili ne nur distris kaj pluinstruis la geknaboj sed ankaŭ iomete modernigis sian malnovan lernejon per aĉetado de materialo (en 10 jaroj tute ŝanĝiĝis la meblaro), kaj eĉ pli grave: la geinstruistoj tiel pli proksimiĝis al la vilaĝanoj, akiris ilian estimon, ilian simpatian, ilian fidon.

ke estus pli taŭge apartigi la infanojn ne laŭ ilia sekso sed laŭ ilia aĝo en du geaj klasoj, Sro Micard instruante la pli aĝajn geknabojn kaj Sino Micard la malpli aĝajn. Sed ilin kontraŭstaris la tradicio reprezentita de la parohestro, kaj de la episkopo: knaboj kaj knabinoj ne sidu sur la samaj benkoj!

Sed la geinstruistoj estis subtenitaj de sia administracio. La geigo efektiviĝis. La episkopo decidis, ke ne plus okazos diservoj en la preĝejo (eĉ ne por la geedziĝoj, baptitoj kaj enterigoj. La kultantoj devis iri al vilaĝo 5 km malproksima kaj riproĉis la geinstruistojn, kiuj ne cedis ĉar ili sciis, ke pli bona estos la instruado. Dum ses monatoj daŭris la kverelo kiu foje fariĝis preskaŭ revolucio (la prefekto proponis sendi al Epineux-le-Séguin ĝendarmojn por protekti gesroj Micard). Post tiu tempo ordo revenis kaj la vilaĝanoj povis denove kulti en la preĝejo. La batalo finiĝis dum kiu Henri Micard, certa je sia praveco, neniam cedis. La kontraŭstaroj ne timigis lin pli ol la malsano.



La domo de Gesroj Micard

Henri Micard ne kontentiĝis per tiu profesia agado. Li ankaŭ helpis la plenkreskajn vilaĝanojn per sia laboro en la administrado de la vilaĝaj aferoj kiel sekretario kaj ankaŭ persone. Ne pasis unu tago, kiam li ne ricevis la viziton de kelkaj samvilaĝanoj je ia ajn horo por informoj pri iu aŭ alia problemoj kiu postulis lian kompetentecon. Li tre ofte, post la laborhoroj iris al iu malproksima farmo por praktiki injekton al malsanulo aŭ eĉ por vindi mortinton.

Sed Henri Micard sciis ankaŭ malkontentigi la vilaĝanojn kiam li konsciis tion necesa. En tia kazo li batalis, ne cedis ĝis la tempo kiam la hieraŭaj kontraŭuloj fariĝis denove amikoj. Jen trafa ekzemplo. En 1936, gesroj Micard, kiuj ĝis nun, devis apartigi la knaboj de la knabinoj en du diversaj klasoj (en ĉiu klaso ĉeestis infanoj de 6 ĝis 12 jaroj), pensis

Ek de tiu jaro 1936, Henri Micard utiligis la Freinet-metodon pri instruado. La presado de siaj propraj « liberaj tekstoj » multe plaĉis al la infanoj, kiuj aperigis gazeton, kiu estis sendita al ĉiuj familioj kaj en 1939-40 al ĉiuj soldatoj el la vilaĝo. Jam de longe (1925) Henri Micard prezentis filmojn edukajn en la lernejo. La unua en la departemento, li tiamaniere lernigis al siaj ĝelernantoj historion, geografion kaj sciencon. Kompreneble li funkciigis la aparaton per la mano, kaj laŭtlegis la klarigojn.

La jaro 1941 vidis la ĉesigon de tiu laboro dediĉita al la geknaboj kaj iliaj gepatroj de la vilaĝo Epineux. Pro sia sinteno, Henri Micard estis sendita al alia vilaĝo. Sed danĝero ŝvebis super lia kapo: la tiama registaro intencis lin senoficiigi. Informite de la inspektoro, kiu sciis kiom valora estis la ins-